El la estraro de Germana Esperanto-Asocio

La 18an de februaro la estraro de Germana Esperanto-Asocio (GEA) kunvenis por priparoli kaj decidi aktualajn aferojn. Germanan Esperanto-Junularon (GEJ) reprezentis unuafoje ties prezidanto Andreas Diemel el Essen.
Andreas Emmerich, prezidanto de GEA, kiel kutime gvidis la kunsidon. Li povis raporti kelkajn bonan novaĵojn pri la jubilea Germana Esperanto-Kongreso (GEK) en Brunsviko komence de junio. La nombro de aliĝoj superas intertempe la limon de 100, kio promesas pli viglan partoprenon ol dum la lastaj jaroj. Pluraj fakaj asocioj, landaj ligoj kaj aliaj Esperanto-instancoj anoncis kunvenojn, tiel ke la kongreso vere meritos sian nomon. Pro la jubileo GEA ankaŭ intencas inviti pli da reprezentantoj de la najbaraj Esperanto-asocioj trans la limoj. Precipe bonvena gasto estos prof. d-ro Renato Corsetti, prezidanto de Universala Esperanto-Asocio. La GEA-komisiito por la GEK, Christian Darbellay, kaj la Loka Kongresa Komitato (LKK) en Herzberg, laborante kun vervo kaj sukceso, liveris buĝeton por gardi la elspezojn.
Zorgojn kaŭzas la adreso <www.esperanto.de>, kiu suferis atakon de hakulo en januaro. Sekve de tio la firmao, kiu disponigis la servilon, nuligis la kontrakton. GEA esperas, ke la sperta fakgrupo de GEJ solvos tiun problemon baldaŭ.
Nekontentiga estas la ekzistanta provizo de varbiloj. Kvankam konsiderinde granda kvanto de la varbado okazas intertempe tra la Interreto, mankas nova faldfolio kaj afiŝoj, kiujn povus uzi ankaŭ lokaj grupoj por inviti al aranĝoj. La demando estas, ĉu profesia firmao (pageble) pli sukcesos kompili ion, precipe ankaŭ enhave montreblan. Sinproponoj aŭ sugestoj el la membraro estas bonvenaj.
Same mankas vortaro Deutsch-Esperanto. La konata aŭtoro prof. d-ro Erich-Dieter Krause jes anoncas ampleksan novan verkon por la estonto, sed estas krome granda bezono por malpli ambicia (kaj multekosta) eldono, kiu servu por komencantoj kaj estu facile kunportebla. Fine mankas ankaŭ moderna lernolibro. La estraro baldaŭ ricevos specimenon de nova manuskripto, kiu estas jam elprovita en pluraj kursoj.
Kiel nuntempe ĉiuj asocioj ankaŭ GEA povus fari multe pli, se estus pli da libervolaj helpantoj, kiuj transprenus tiun aŭ jenan taskon. Momente pluraj komisiaj postenoj vakas. Unu el la plej urĝe bezonataj estas la administrado de la enira retpaĝo por GEA (sub la adreso <www.esperanto.de>), kion ĝis nun sperte kaj lerte prizorgis Franz Kruse. Posteulo anoncu sin al la estraro.
Alia urĝa tasko estas la traduko de la libro „Zamenhof-strato“ en la germanan lingvon. La estraro devas unue ekhavi la tradukon de specimena parto por montri ĝin al eldonejoj, kiuj havas intereson lanĉi la germanan version. Ankaŭ tiurilate la estraro alvokas al sinanoncoj.

Raportis:
Rudolf Fischer

Dankon al Franz Kruse

Nia komisiito por la Interreto, Franz Kruse, kiu dum longa tempo prizorgis i.a. nian retpaĝaron, lastatempe rezignis pri tiu posteno. La estraro kore dankas al li pro lia valora kontribuo.

Andreas Emmerich
prezidanto de GEA

Deutscher Esperanto-Bund Mitgliederversammlung

Der Deutsche Esperanto-Bund lädt zur Bundesversammlung 2006 ein, die im Rahmen des 83. Deutschen Esperanto-Kongresses in Braunschweig im Hotel Mövenpick, Welfenhof/Jöddenstr. 3, stattfindet. Die Versammlung beginnt am Sonntag, 4. Juni, um 9.30 Uhr.
Die Einladung und die Tagesordnung wurden in *Esperanto aktuell* 2006/1 veröffentlicht.

Red.

Jubiläumskongress in Braunschweig

Der Deutsche Esperanto-Bund lädt anlässlich seines 100-jährigen Bestehens zum Jubiläumskongress nach Braunschweig ein, in die Stadt, in der die Wiege der deutschen Esperanto-Bewegung stand.

Red.

Deutscher Esperanto-Bund Neue zentrale Anschriften

Auf seiner Sitzung vom 18. Februar 2006 beschloss der Vorstand des Deutschen Esperanto-Bundes, die zentralen Adressen (siehe Impressum in *Esperanto aktuell*) zu ändern, da die Geschäftsstelle nicht mehr in Freiburg ist.
Die Adresse des Verbandes ist jetzt mit der des stellv. Bundesvorsitzenden, Dr. Rudolf Fischer, identisch. Vorübergehend dient sie darüber hinaus für die allgemeine Post an die Geschäftsstelle, bis die Renovierung des Esperanto-Hauses in Berlin abgeschlossen ist. Für alle Tätigkeiten per Netzpost und Telefon ist ab sofort Martin Schäffer aus Stuttgart zuständig. Er ist über die Mailadresse deb@esperanto.de und über die Rufnummer 01803773726 und 0180ESPERANTO erreichbar.

Andreas Emmerich
Vorsitzender

Redaktion Neue Telefonnummer

Die Redaktion von *Esperanto aktuell* hat eine neue Telefonnummer: Sie lautet 0700/AlfredSchubert. Da die Nummer nur acht Stellen hat, reicht es, 0700/AlfredSc bzw. 0700/25373372 zu wählen. Aus dem Ausland ist +49/700/AlfredSc zu wählen. Der Freischaltungstermin der Nummer stand bei Redaktionsschluss noch nicht fest.
Wegen eines Problems des Fax-Anbieters hat dieser eine Nummerngruppe abschalten müssen, in der auch die Nummer der Redaktion war. Bei Redaktionsschluss stand noch keine neue Nummer fest.
Die Redaktion ist aber weiterhin per Netzpost über die bisherige Adresse (Alfred.Schubert@esperanto.de) zu erreichen. Auch die Postanschrift ist unverändert: Pf. 1539, 82355 Weilheim.

Red.